



COMITÉ DE INICIATIVAS
Y TURISMO



SEVILLA 1928

KATOLIKA
LIBROVENDEJO

HOHENLEITER


VELÁZQUEZ, 6 * SEVILLA

ĈIAJ RELIGIAJ AĴOJ, PRĜLIBROJ,
METALAJ EMBLEMOJ, ROZARIOJ,
LIGNAJ KAJ LIGNOPASTAJ STA-
TUETOJ KAJ BILDOJ, MEDALOJ,
FOTOJ KAJ ĈIAJ ALIAJ BILDOJ,
KRUCUMITOJ, K. T. P., K. T. P., ĈIO
TRE MALKARA KAJ EKSTERORDI-
NARE VARIA ĈE LA PLEJ DELIKATA
ARTOEMO KAJ RELIGISENTO

NEPRE VIZITU ĈFTIUM VENDEJON

908
COM
SEV

Comité de Iniciativas
y Turismo
SEVILLA



FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

4625

H O H E N L E I T E R
TALLERES TIPOGRÁFICOS § VELÁZQUEZ, 6 § SEVILLA

.....
Esta Guía es propiedad del
Comité de Iniciativas y Tu-
rismo, de Sevilla * * *
.....

TABELO DE ENHAVO

(INDEKSO)

<i>Alcázar Real</i>	Paĝo	9
<i>Archivo de Indias</i>	»	12
<i>Ayuntamiento</i>	»	14
<i>Capilla de San José</i>	»	16
<i>Casa de Pilatos</i>	»	16
<i>Casa del Duque de Alba</i>	»	21
<i>Catedral</i>	»	22
<i>Convento de San Clemente</i>	»	32
<i>Convento de Santa Paula</i>	»	34
<i>Hospital de la Santa Caridad</i>	»	36
<i>Hospital de los Venerables Sacerdotes</i>	»	38
<i>Iglesia de San Pablo</i>	»	42
» <i>Santa Ana</i>	»	44
» <i>del Divino Salvador</i>	»	48
<i>Murallas Romanas de la Macarena</i>	»	48
<i>Musco Provincial de Bellas Artes</i>	»	50
<i>Torre de Don Fadrique</i>	»	52
<i>Universidad</i>	»	54
<i>Aliaj lokoj Vizitindaj</i>	»	59
Ekskursoj: <i>Alcalá</i>	»	62
<i>Áracena</i>	»	63
<i>Gruta de Las Maravillas</i>	»	65
<i>Carmona</i>	»	67
<i>Itálica</i>	»	67
<i>Mairena</i>	»	68



COMITÉ DE INICIATIVAS Y TURISMO

CENTRA INFORMEJO ĈE LA URBODOMO

Ĉi tiu Oficejo liveras senpage tute detale ĉiajn informojn pri nia urbo, pri ĝiaj monumentoj, ekskursoj, publikaj servoj kaj cetere, kaj bonvoleme kompleksos vizitanton je ĉiu momento.

S E V I L L A

Sevilla estas la plej riĉa trezoro el fruktodona kaj miriganta Andaluzio. Estas lulilo de la kavalireco kaj gastemeco, kaj la plej sincera esprimo de la hispana animo.

La lando estas kvazaŭ florejo plena je lumo, kie la spirito fariĝas pasioj kaj la koro sentas delikatege.

Ĉe ĝiaj mallargaj stratoj la kantstrofoj de la virinoj, freŝaj floroj naskiĝantaj el iliaj ruĝaj lipoj, trafas niajn aŭdojn kvazaŭ ĉiuj ĉe tute absoluta senbruo, aŭ plendoj de kantsprucanta fontano. Kaj la Amo vagadas sur la oraj vojetoj de la ĝardenoj. la plej abundegaj je floroj, pro-

ponante al ni en ĉiu momento la ĝojon fortigantan de siaj feliĉoj, aŭ la mildan lamenton de siaj dolorantaj plendoj.

La sekreto de lia tiranio kuŝas ĉe la gracio de la sevillaj brunulinoj; ĉe la penetranta rigardo de iliaj nigraj okuloj; ĉe la dolĉa muziko de iliaj paroloj, kaj ĉe ilia profunda kaj sincera amo. Kaj ĉe la bordo de l'Gvadalkiviro, la najtingaloj faras siajn blankajn nestojn, kaj iliaj doloraj plendoj estas kvazaŭ triloj ĉe iliaj gorĝoj, kaj la amo ĉe iliaj koroj hvazaŭ mortiganta vundo.

En Sevilla ĉio estas ĉarma kaj mirinda. El ĝia glora pasinteco restas al ni, kiel altvaloregaj riĉaĵoj, legendoj pri ĝiaj plej famaj historiaj okazintaĵoj kaj la mirigantaj monumentoj elmontrantaj ĝian inspiron, ĝian heroecon kaj ĝian grandecon. La legenda trezoro de ĝia ardanta kaj pasia spirito elvidiĝas per la «Venta de los Gatos» («Survoĝgastejo de la Katoj»), kiun senmortigis Bécquer, per la «Susona», per D. Miguel de Mañara (D. Mikaelo de Manjara) kaj per aliaj multenombregaj inspiritaĵoj de la fantazio aŭ per realaj mirindaĵoj, kaj samtempe la epopea konkiro de la urbo, kiun trafis la Reĝo Ferdinando III^a la Sankta, kaj la eliro de la ŝiparo de Magallanes por ĉirkaŭnavigacii la mondon, estas la plej eterne memorindaj historiaj okazintaĵoj el ĉiuj ĝiaj ceteraj. El ĝiaj plej karakterizaj monumentoj estas tre cifindaj: la romanaj remparoj, la Katedralo, kun ĝiaj artegaj kaj riĉegaj juveloj, skulptaĵoj, pentraĵoj, kradoj, kaj kolorigitaj vitraĵoj; La Reĝa Alkazaro, filigrano el emajlitaj brikoj, gipsoĉizitaĵoj kaj ĉizitaj plafonoj kun inkrustitaĵoj el perlamoto

kaj eburo; La Turo de D. Fadrique, majesta kaj fortimpona meze de ĝardenoj; La Sankta Caridad (Sankta Bonfaremo) gardejo el plej riĉaj artotrezoroj de Murillo kaj Valdés Leal; La Casa Lonja (Komerca Borso), arĥitekturaĵo devenanta de la genio de Herrera, kie estas la Arĥivo de la Hispanamerikaj Kolonioj (Archivo de Indias), entenanta la netakseblan altvaloran dokumentaron pri la malkovro kaj koloniigo de Ameriko; kaj, fine, la Giralda, la Turo ridanta, laŭ la genia esprimo de l' poeto, monumento kvazaŭ punktitaĵo subtila, gracia, kaj samtempe forta, sama kia estas la animo de Sevilla, kies gloraro elradias al la tuta Hispanujo, senmortigante ĉi tiun popolon.

Sed Sevilla ne estas urbo vivanta nur kaŭze de siaj pasintaĵoj, sed konstante renoviĝanta, evoluanta, progresanta ĉiutage kvazaŭ Dimirakle. Ne perdante sian tipan kaj legendan karakteron, ĝi scias adaptiĝi al la nuntempa progreso, kaj nelacigeble laboradas por havigi al si tute certe la triumfon de l' estonteco. Ĉi tiu estas la karakterizo kiu pli ĝin diferencigas rilate al aliaj hispanaj urboj. Ĉar Sevilla scias harmoniigi la gloron de sia granda pasinteco kun la postuloj de la moderna vivo, enkondukante unu kaj aliajn al idealo de venonta epoko.



GRANDAJ MAGAZENOJ

{ Pogrande kaj pomalgrande el ĉiaj lastaj modaĵoj
Ĉi tie oni trovos ĉiajn naciajn kaj fremdajn teksitaĵojn

CIUDAD DE SEVILLA

LA HERA Y COMPAÑÍA S. EN C.

LA PLEJ FIDINDA VENDEJO POR ŜALOJ
DE MANILO KAJ KAPŜALOJ EL PUNTO


SPECIALA FAKO POR VIRINAJ KAJ INFANAJ KOSTUMOJ

MIRIGANTA FAKO POR BLANKAJ INTERNAJ VESTAROJ : SPECIALE POR FIANĈINOJ KAJ ĴUSNASKITOJ

VESTAROJ POR SINJOROJ

ĈAPELOJ POR VIRINOJ LAŬ MODELĴOJ DE LA
PLEJ FAMAJ FIRMOJ DE PARIZO

ALCÁZAR DE SEVILLA



(De las Guías Baedeker's)

ALCÁZAR REAL

(REGA ALKAZARO)

Patio de Banderas (Korto de la Flagoj). (Urbokarto H4).
Malfermita la tutan tagon, Eniro: Du pesetojn, palaco kaj ĝardeno.

El la arĥitekturaj monumentoj, kiuj faras Sevillan la unua arta urbo de Hispanujo, oni devas citi unuavice la Alkazon.

Oni starigis ĝin sur la ruinoj de alia araba palaco kaj oni beligis ĝin per verkoj de altgrada arto dum ses jarcentoj.

Sur ĝiaj muroj flirtis la flago de Sankta Fer-

dinandò, la 23^{an} de Novembro de 1248^a, kaj je tiu tempo oni komencis la aliformiĝon, kiu oni daŭrigis dum la regadoj de Petro I^a, Johano II^a, Karolo V^a, la Filipinoj kaj Alfonso XIII^a.

El la araba konstruaĵo nur restas la ĉefa portalo ĉe la Korto de la Montería, La Korto Granda (Patio Mayor), tiu de la Pupoj (De las Muñecas), Salono de Ambasadoroj kaj iuj ĉambroj najbaraj je ĉi tiu.

Oni malkovris ĵus interesajn restaĵojn de tiu arĥitekturo ĉe la enirejo al la Korto de la Montería kaj ĉe la Salono de l' Justeco.


La ĉambroj de l' Alkazaro prezentas siajn murojn el belegaj blanaj kaŭ belkolorigitaj gipsoĉizitaĵoj, el belbrilaj emajlitaj brikoj, siajn plafonojn el riĉaj mirinde artlaboritaj lignoj, kaj ĉio potence allogas la atenton de la vizitanto tiel pro sia arta valoro, kiel pro sia granda rememoriganta povo.

El ĉiuj ĉambroj k. t. p. el la teretaĝo oni devas citi plie la Korton de la Fraŭlinoj (de las Doncellas) kaj Salonojn, kiujn oni nomas de la Gipso (de l' Yeso).

La ĉefetaĝo, kiun okupas la Reĝa familio, kiam ĝi loĝas en Sevilla, havas grandioze ornamitajn salonojn, kun altvalorajn damaskoj kaj gobelenoj, el ĉi tiuj iuj kvazaŭ orientaj.

Estas tre rimarkinda la privata hapeleto nomata de la Katolikaj Reĝoj, kies altaro konsistas el briko de Triana (Kvartalo de Sevilla), kiujn kolorigis la peniko de Niculoso Pisano. Ankaŭ estas vizitinda la granda Kapelo ĉe la teretaĝo, en kiu estas pentraĵoj tre artvaloraj.

Eksterordinare interesaj kaj rimarkindaj estas ĝiaj ĝardenoj, en kiuj estas abundaj la mirtoj,



Alkazaro: Portalo de la Korto de la Montería

jasmenoj, oranĝarboj kaj palmoj, kun belegaj fontanoj el marmoro kaj emajlitaj brikoj. Najbaraj je tiuj, kiuj estis vintraj ĝardenoj, estas la banejo de María Padilla, en kiu oni malkovris nombrajn galeriojn, iuj el ili havas murpentraĵojn. Preskaŭ ĉe la centro de la ĝardeno, staras la pavilono de Karolo V^a, kun riĉa skulptita lignoplafono kaj belegaj emajlitaj brikoj de tiu epoko.

La modernaj ĝardenoj ankaŭ estas indaj je admiro pro sia beleco. Ĉe ilia enirejo staras granda arta pordo, kiun oni venigis de Marchena.

ARCHIVO DE INDIAS


(ARĤIVO DE HISPANAMERIKAJ KOLONIOJ)

Strato Primo de Rivera (Urbokarto. H. 4). Malfermita de la 9^a matene ĝis la 2^a posttagmeze, labortage. Eniro senpaga.

Ĉi tiu Arĥivo okupas la teretaĝon kaj ĉefetaĝon de la Komerca Borso, mirinda konstruaĵo, staranta inter la Katedralo kaj la Reĝa Alkazaro.

La impona ŝtonkonstruaĵo estis projektata de Herrera, fama arĥitekturisto stariganta la Monaĥejon de l' Escorial.

La Reĝo Karolo III^a ordonis formi la Arĥivon, kiu entenas la riĉe mirindan trezoron pri la tuta Kolonia Historio de Ameriko, dum la Jaro 1784^a. La dokumentoj estas ordigitaj kaj konservitaj en luksegaj ŝran koj el ligno kaj vitro.



Alkazaro: Salono de Ambasadoroj

Por homo enamiĝinta kun la progreso kaj civilizacio de l' homaro kaj de la Historio, la Arĥivo proponas grandegan intereson, des pli por la amerikanoj, ĉar tie estas la atesto pri la naskiĝo de ĉiuj iliaj hispanamerikaj popoloj eĉ de iliaj prauloj.

AYUNTAMIENTO (URBODOMO)

Plaza de la Constitución (Urbokarto. F. 5). Oni povas viziti la suban parton dum la tuta tago, la ĉefetaĝon (Bibliotekon) de la 10^a matene ĝis la 1^a posttagmeze. Senpage. Ĉe la monumenta parto de ĉi tiu konstruaĵo, turisto trovos la Oficejon por informoj de la Komitato por Iniciativo kaj Turismo, en kiu, senpage, oni liveros al li broŝurojn, gvidlibrojn kaj afiŝojn pri Sevilla, ĉiajn informojn pri la urbo, pri ĝiaj monumentoj, ekskursoj, k. c.

Ĝi estas belega specimeno de la plej delikata renesanca stilo (XVI^a jarcento). Estas tre interesaj: La Gildosalono kun renesanca friso kaj skulptita plafono el ŝtono; la Oficejo de la Komitato por Turismo, kies belega arĥitekturo montras transiron de la gotika stilo al la renesanca stilo; la Biblioteko, kun riĉa skulptita lignoplafono orumita, kun rimarkindaj dokumentoj, moneraro, urbostandardo (epoko de la Katolikaj Reĝoj), k. c.



Alkazaro: Korto de la Pupoj

CAPILLA DE SAN JOSÉ

(KAPELO DE SANKTA JOZEFO)

Strato Jovellanos, N. 10 (Urbokarto. F. 5). Oni povas ĝin viziti je kiu ajn horo. Senpage.

La Korporacio de la Ĉarpentistoj starigis ĝin je la honoro de sia Patrono Sankta Jozefo. Ĉiuj altaroj kaj la miriganta ornamaĵaro de l' muroj same kiel la arkajo estas barokaj. La lignoplafo, sur kiu staras la belega orgeno, estas mudeharstila (stilo de la hispanaj maŭridoj).

CASA DE PILATOS

(DOMO DE PILATOS)

Placo de Pilatos, N. 1 (Urbokarto. F. 2). Malfermita dum la tuta tago. Enirbileto po 0,50 por la Bonfarema Asocio.

Tiel estas nomata ĉi tiu palaco kiu estas propraĵo de la Duko de Medinaceli, kaj tiel oni alnomis ĝin, ĉar estas popola kredo, tradicia opinio, ke oni starigis ĝin laŭ esis la palaco en kiu loĝis Poncio Pilatos en Jerusalemo, kiam li partoprenis la juĝon de Jezuo Kristo. Don Pedro Enríquez kaj lia edzino Donja Katalina de Ribera ordonis ekstarigi ĝin je 1500^a; ilia filo Don Fadrique, unua Markizo de Tarifa, daŭrigis la konstruadon, reveninte de vojaĝo, kiun li faris



Alkazaro: Pordo de Marchena

LA GIRALDA

CASTILLEJA DE LA CUESTA :: STRATO REAL n.º 4

Fabriko de plankapiŝoj el nodoj faritaj mane, kaj de tapiŝoj :: Oni purigas kaj konservas ilin laŭ interkonsentitaj prezoj :: Oni fabrikas, aranĝas kaj reformas, ĉiajn tapiŝojn el ĉiuj epokoj kaj stiloj.

Félix Bernáldez Martínez

Premiita de la Ekspozicio de Filadelfio je 1926 per Ora Medalo :: Firmo Provizinta la Grandan Hotelon Alfonso XIII

Adreso por mendoj: Str: MARQUÉS DE TABLANTES n.º 68 - SEVILLA

ESPERANTO

HELPA INTERNACIA LINGVO


ESPERANTA INFORMADO

LOKA: "Sevilla Esperantista Grupo"
Adreso: Strato Rioja n.º 25 SEVILLA

NACIA: "Hispana Esperanto-Asocio"
kaj "Hispana Esperanto - Instituto"
Adreso: Strato Sagasta n.º 10 MADRID

INTERNACIA: "Universala Esperanto - Asocio"
Adreso: Strato Boulevard du Théâtre n.º 12
GENÈVE: GINEBRA (Suiza)

SEVILLA: Urbo de la "VIIª Hispana Kongreso de Esperanto"



Alkazaro: Ĝardeno antaŭ la Pavilono de Karolo Vª

al la Sankta Tero, kaj perfektigis kaj finis Don Per Afán, unua Duko de Alcalá kaj Vireĝo de Nápoles.

El bela mudehara stilo. Ĝia ĉefa korto estas mirinda pro siaj suba kaj supra galerioj, kvar kolosaj statuoj kaj belega fontano riĉigas ĉi tiun korton. Ankaŭ estas admirindaj: la Kapelo, kies ogiva volbo estas ornamita el arabajoj; la ĉefa ŝtuparo, trezoro el emajlitaj brikoj kaj skulptitaj plafonoj; glupentraĵo de Pacheco, kiu orna-

BANCO HISPANO AMERICANO

SIDEJO: Plaza de Canalejas, 1
MADRID

SUDA FILIO: Strato Duque de Alba
Numero 15

TELEGRAFADRESO:
HISPAMER



Kapitalo kaj rezervoj	129.000.000
Kurantaj kontoj	766.000.000
Deponitaj valoroj.	2.380.000.000
Tuta sumo de la Bilanco je la 31 de Januaro de 1928	3.389.000.000



40 FILIOJ EN ĈEFURBOJ DE PROVINCOJ
68 FILIOJ EN URBOJ

ĜI HAVAS KORESPONDANTOJN POR FINAN-
CAJ AFEROJ EN ĈIUJ GRAVAJ URBOJ DE LA
MONDO KAJ EN ĈIUJ LOKOJ DE HISPANUJO
EN KIUJ ĀNKORAŬ ĜI NE HAVAS FILION



Domo de Pilatos: Ĉefa Korto

mas la plafonon de la salono, nun Contaduría
(Kontorejo), kaj ĝiaj belegaj ĝardenoj.

CASA DEL DUQUE DE ALBA (DOMO DE LA DUKE DE ALBA)

Strato Dueñas, N. 3 (Urbokarto. D. 3). Malfermita dum la
tuta tago. Senpage.

En ĉi tiu Palaco kuniĝas kvazaŭ arta ensorĉo, la stilo mahometa, ogiva kaj renesanca. Ĉi tiun domon fondis membroj el la nobela familio Pineda, kaj je 1483^a, ĉi tiu familio vendis ĝin al Donja Katalino de Ribera, edzino de l' Adelantado (Alfranga politikmilitista posteno) Don Pedro Enríquez.

Antikve, ĝi havis dekunu kortojn, kun pli ol cent kolonoj el marmoro, kaj naŭ fontanojn, sed nuntempe ĝi estas pli malvasta.


Ĉe ĝiaj salonoj kaj kapeloj oni povas admiri mirindajn frisojn el gipso belegajn emailitajn brikarojn kun metalaj briloj, kies altvaloro estas tre alta. Ankaŭ estas admirindaj ĉe la ĝardeno belegaj kradoj el fero forĝitaj je la XVI^a jarcento.

CATEDRAL

(KATEDRALO)

Strato Gran Capitán (Urbokarto. G. 4). Malfermita de la 6^a. ĝis la 12^a. matene, kaj posttagmeze de la 2^a. ĝis la 6^a. Senpaga eniro. Por viziti La Trezorejon, Gildsalonon, Grandan Sakristion kaj Kapelojn, la horoj estas: matene de la 10^a. ĝis la 12^a.; posttagmeze de la 3^a. ĝis la 5^a. po unu peseto. Supreniro al la Giralda, 0,25, kaj oni ne permesas al unu sola persono supreniri.

Oni ordonis ĝin konstrui je 1401^a sur la sama loko, kie staris la granda Moskeo de la Araboj, kaj ĝi estas unu el plej vastaj gotikaj katedraloj de la mondo. La internaĵo mirigas pro la grandiozece de sia arkitekturo kaj pro la majesteco kaj beleco de siaj altaj navoj. La granda altaro estas mirin-



Domo de la Duko de Alba

E. RODRIGUEZ DE LA BORBOLLA

AGENTO POR DOGANOJ, MAKLERISTO KAJ

REPREZENTANTO DE NAVIGACIAJ KOMPANIOJ

AGENTO

de la Minkompanioj de
CALA, CASTILLO DE LAS
GUARDAS, COTO TEULER,
COTO VICARIO kaj PEÑA
COPPER MINES LD.



AGENTO

de TRANSMEDITERRANEA
KOMPANIO SOTA kaj AZNAR
kaj aliaj.

TELEGRAFADRESO:

Eladio Borbolla - Sevilla

STRATO ALMIRANTE LOBO, 22 :: TELEFONO N.º 57

SEVILLA

MAJESTIC HOTELO

UNUARANGA

300 ĈAMBROJ :: BANEJOJ

PLENA OPORTUNECO :: GRILL ROOM

AMERIKANA BAR

PROKSIMA JE 200 METROJ DE LA STACIDOMO

KAJ ĈE LA CENTRO MEM DE LA URBO


AVENIDA DE CANALEJAS, 1



Domo de la Duko de Alba


da gotikaĵo, kiun skizis Dancart, kaj konsistas el kvardek kvin niĉoj aŭ fakoj kun altreliefaj skulptitaj scenoj de la Nova kaj Malnova Testamentoj. Ĉe la ĉefa ĉambreto estas la arĝenta statuo de Nuestra Señora de la Sede, el XIV^a jarcento. La mirindaj kradoj el fero orumita estis planataj kaj forĝataj de la nepastra monaĥo de Sankta Domingo Francisco de Salamanca, laŭ la plej pura renesanca stilo.

La florejo, kontraŭ la granda kapelo, havas



KATEDRALO

(De las Guías Baedeker's)



LA KATEDRALO

seĝaron el 117 lokoj, kaj la stilo de la skulptitaĵoj estas ogiva. La granda librotenilo staranta ĉe la centro de la Ĥorejo estas el ligno kaj bronzo, mirinda arta verko de la XVI^a. jarcento, kaj same mirindaj kaj artaj estas la ĥoraj libroj de la XV^a. ĝis XVII^a jarcentoj. La krado, tiel interesa kaj arta, kiel tiu de la granda kapelo, estas verko de la aludita monaĥo. La postĥorejo estas marmora, laŭ stilo de la XVII^a jarcento. La kapeloj ĉe la flankoj de la Ĥorejo estas el la

transiro de la stilo gotika al la renesanca, kaj estas belaj, interesaj kaj artaj.

Meritas tre grandan atenton la kapelo de la Concepción (Dienkarniĝo), en la suda flanko, kies statuoj de la Sankta Virgulino estas majstra verko de Montañés.

CAPILLA REAL: (Reĝa Kapelo): El renesanca stilo, ĝin planis Marín Gainza, je la XVI^a. jarcento. Enirante, dekstren, staras la maŭzoleo de Donja Beatriz de Suavia; maldekstren, tiu de Don Alfonso la Klerulo.

Ĉe la piedo de la granda altaro, estas urno el arĝento orumita entenanta la korpon de Sankta Ferdinando, de la Reĝo konkirinta Sevilla'n el la povo de la Araboj, je 1248^a. Ĉe la altaro de l' fundo staras la Sankta Virgulino de la Reĝoj mirinda skulptaĵo de la XIII^a. jarcento, kiun, laŭ la tradicio, donacis la Reĝo de Francujo, Sankta Ludoviko, al Sankta Ferdinando. Pordeto de post la urno alkondukas al la Reĝa Tombaro, kies kuŝas Don Pedro I^o. (la Kruela), Donja María de Padilla, la Reĝidoj Don Pedro, Don Fadrique kaj aliaj, ĉe siaj respektivaj maŭzoleoj; kie staras la malgranda statuoj el eburo de la Sankta Virgulino de la Bataloj, kiun portis ĉiam la Sankta Reĝo sur la selo de sia ĉevalo.

La Granda Sakristio, el renesanca stilo, de sur kies muroj pendas pentraĵoj de Murillo kaj la fama «El Descendimiento» (la Malleveno de la Krucumito) de Pedro Campaña; kie staras arĝentaj statuoj de Sankta Leandro kaj Sankta Isidoro, alia de Sankta Ferdinando, de Pedro Roldán; kie oni konservas la mirigantan trezoron konsistantan el la Granda Hostia Montrilo.



Katedralo: Posihorejo




kaj Portilo, verko de Arfe; La grandega kandelabro el bronzo, de B. Morel; la Alfonsaj Astro-
nomiaj Tabeloj, aliaj kandelingoj, krucoj, vazoj,
k. t. p. Tiu de la Kalikoj, el floranta gotika stilo
(lasta periodo de tiu ĉi stilo), kie oni admiras
belegan skulptitan Krucumiton de Martínez Mon-
tañés, kaj pentraĵojn de Murillo, Luis de Var-
gas, Rubens, Goya, kaj de aliaj senmortaj artis-
toj, kaj la abundan mirigantan riĉan pastroves-
taron, relikvojn kaj kultilojn.

La Gildsalono, elipsoforma, ornamita laŭ la
renesanca stilo, same, kiel la Sakristioj Granda
kaj de la Kalikoj, estis konstruata de Diego de
Riaño dum la XVI^a jarcento. Bela plafono, dek-
ses marmoraj altreliefaj kaj belegaj pentraĵoj de
Murillo kaj Pacheco estas en ĝi.

Antaŭ la pordo de Sankta Cristóbal staras
la tombo de Cristóbal Colón, verko de A. Méli-
da, translokita de la Habana al Sevilla, je 1898^a:
Kvar Heroldoj, kiuj reprezentas la Regnojn de
Kastilujo, Leono, Aragono, kaj Navarra, ŝul-
trenportas la ĉerkon.

En la flankaj kapeloj estas tre atentindaj: la
Sankta Antono de Murillo, en la Bapta kapelo;
la Sankta Virgulino kaj la Infano de Alonso
Cano, ĉe la altaro de la Sankta Virgulino de
Belén; pentraĵo nomata de la Gamba, de Luis
de Vargas, ĉe la altaro de la kapelo ankaŭ tiel
nomata; murpentraĵo de la Sankta Virgulino de
la Antikva, en la kapelo tiel nomata; la Anĝelo
de l' Gardo, de Murillo, ĉe la altaro de l' Sankta
Anĝelo, k. t. p.

Tutsame estas interesaj, plenaj je arta valo-
ro, vitraĵoj kaj kradoj; ankaŭ la pordoj, kiuj
havas belegajn statuojn el koto bakita.



Katedralo: Korto de la Oranĝarboj

La plej bela el la pordoj estas tiu nomata de de l' Pardon, kies stilo estas araba, enirejo al la korto de la oranĝarboj. Flankdekstren de ĉi tiu, estas la enirejo al la Kolumba Biblioteko (malfermita de la 10^a. matene ĝis la 2^a. posttagmeze vintre, kaj de la 9^a. matene ĝis la 12,30^a. somere) kie oni konservas la librojn apartenintajn al Hernando Colón.

En la Giralda'n, kiu estis moskea turo je la XII^a jarcento. kaj kiun altigis per aliaj surkonsruitaj korpoj, je la XVI^a., oni eniras tra pordeto najbara je tiu de la Katedralo nomata de l' Palos.

CONVENTO DE SAN CLEMENTE


MONAĤEJO DE SANKTA CLEMENTE

Strato Santa Clara n^om. 79 (Urbokarto. A. 5). Oni povas ĝin viziti je kiu ajn horo matene aŭ posttagmeze. Senpaga eniro.

Ĝin fondis Sankta Ferdinando je la XIII^a jarcento, kaj ĝi okupas la lokon, kie staris la palacoj de la Monarĥoj «Abbaditas». Ĉe ĉi tiuj palacoj, Almotamid gastigis Yusuf-ben-Tesufin post la batalo de Zalaca.

De la epoko de la Reĝa Konkirinto, ĉiuj reĝoj havis preferon al ĉi tiu monaĥejo, tre speciale la Katolikaj reĝoj, Filipo II^a kaj Karolo III^a, kiu renovigis ĝin de 1770^a ĝis 1771^a.

Ĉe ĝia preĝejo estas admirindaj, la plafono el ligno tre arte kaj delikate ĉizita («Alfarje, prononcu Alfarĥe), de la XVI^e jarcento; la tom-



Katedralo: Unu el la navoj

bo de la Reĝino Donja María de Portugalujo, edzino de Alfonso XI^a kaj patrino de Don Pedro I^a; pentraĵo de Juan Valdés Leal, kiu reprezentas la eniron de Sankta Ferdinando en Sevilla'n ĵus ĝin konkeris li; ok malgrandaj pentraĵoj, kiujn oni atribuas al Pacheco, kaj la emajlitaj brikoj de la muroj, el la kvartalo Triana.

CONVENTO DE SANTA PAULA

MONAĤEJO DE SANKTA PAŬLA

Strato Santa Paŭla (Urbokarto. D. 2). Malfermita dum la tuta tago. Senpage.

Oni ĝin fondis je 1475^a, dum regado de la Katolikaj Reĝoj. La portalo ogivostila kaj laboritaĵoj el emajlitaj brikoj estas unu el plej bonaj de ĉi tiu sevilja arto. Ĉe la portalo metis la tutmondfama senmorta geniulo Cervantes la finon de sia belega novelo «La Española Inglesa» (La Angla Hispanino). La preĝejo enhavas belajn skulptitaĵojn kaj statuojn de Alonso Cano.

Ĉe salonoj kaj galerioj la muroj prezentas delikatajn emajlitajn brikojn de la XVI^a jarcento.



Katedralo: La turo «Giralda»

HOSPITAL DE LA SANTA CARIDAD
HOSPITALO DE LA SANKTA CARIDAD
(BONFAREMO)


Strato Temprado n^om. 5. (Urbokarto. H. 5). Malfermita dum la tuta tago. Enirbileto po 2 pesetoj kvazaŭ almozo.

Najbara je la Dogano, staras ĉi tiu konstruaĵo, kiun oni konstruis je 1664^a, dank' al sindonemeco de la Kavaliro de la Milita Ordeno de Calatrava, Don Miguel Mañara Vicentelo de Leca.

Oni fondis ĝin por gastigi transirantajn almozulojn kiel hospitalon por infektaj malsanuloj; ĝi ankaŭ estis rifuĝejo kaj helpejo por transloki forlasitajn malsanulojn al aliaj hospitaloj; entirigi neidentigitajn dronintojn, zorgi lastmomente kaj enterigi la mortkondamnitajn.

La vasta konstruaĵo enkalkulas belegan preĝejon, sub kies granda altaro kuŝas la restaĵoj de la modesta fondinto. Ĉi tiu preĝejo estas kvazaŭ relikvujo en kiu oni gardas artverkojn el plej riĉaj kaj interesaj. La grandaltaro estis konstruata de la sevilja artisto Bernardo Simón Pineda, kaj ĝin orumis, kaj sur la poluritan orumitaĵon, reliefigis kaj kolorigis Juan Valdés Leal; la centra skulptitaĵo tiuj de Sankta Roque kaj Sankta Jorge estas de la famega Pedro Roldán.

Ĉi tiu skulptisto laboris la Sanktan Krucumiton de la Bonfaremo, la statuon de la Bonfaremo kaj iujn infanojn, kiuj aperas ĉe la voĉreflektiilo de la predikejo. Li ankaŭ ĉizis la cete-



Hospitalo de la Sankta Bonfaremo: Kortoĵo

rajn altarojn, kaj ĉe unu el tiuj ĉi staras mirinda Ecce Homo de Alonso Cano, kiun oni konsideras la hispana Miguel Angel.

Oni admiras ĉe ĉi tiu preĝejo la famajn pentraĵojn de Murillo «La Miraklo de l'Akvo», «La Miraklo de la Pano kaj Fiŝoj» kaj aliajn, kiuj reprezentas Jezuon, Sanktan Johanon la Baptiston, la Anunciacion kaj Sanktan Johanon de Dio, ĉi tiu lasta estas laŭ stilo de l'Españoleto; la tiel famajn de Valdés Leal «Fino de la Mon-

daj Glorĵoj», (Restaĵoj de la Vivo), «La Altigeĝo de la Sankta Kruco»; Ok pentraĵojn de la sevila skolo, kiujn oni atribuas al Meneses Osorio, kaj aliajn, kiuj estas malpli interesaj de la sama skolo.


En la Gildejo oni admiras la portreton de la fondinto laŭ plena korpo, kiun pentris Valdés Leal; pentraĵon de l'Kordoba Pablo de Céspedes, «Vizio, Sankta Kajetano»; Sanktan Mikaelon, kiun oni atribuas al Juan de Roelas; tri pentraĵojn sur ligno, de Petro Núñez de Villavicencio, kiuj reprezentas bonfarajn scenojn; la spadon kaj arĝentan mangilaron, kiujn uzis la fondinto; la originalan peticion por aliĝo, kiel membro, al la Sankta Institucio, kiun subskribis Bartolomé Esteban Murillo, kaj aliajn estimindajn kuriozaĵojn.

HOSPITAL DE LOS VENERABLES SACERDOTES

(HOSPITALO DE LA RIVERENCINDAJ PASTROJ)

Plaza de los Venerables. (Urbokarto: H. [5]). Malfermita de la 1.^a posttagmeze ĝis la 4.^a. Per monalmozo oni atingas la enirpermeson.

Ĝi staras sur loko de domoj apartenintaj al Duko de Veragua kaj de teatro en kiu oni ludis la komediojn de Lope de Rueda, ĉe la plej centra parto de la Kvartalo Sankta Cruz. Ĝin fondis kanoniko Justino de Neve, kiel rifuĝejon por maljunaj senfamiliaj pastroj.



Turo de l'Oro

La korto estas belega kun mirindaj galerioj, kies arkajarojn surportas marmoraj kolonoj; ĉe la centro, estas interesa fontano ornamita el emajlitaj brikoj.

Abundaj ĉiam freŝaj floroj parfumas la enaeron de ĉi tiu hela kaj trankvila anguleto de la urbo, anguleto la plej paca.

Apud la korto staras la preĝejo dediĉita al Sankta Ferdinando, en kiun oni povas eniri tra pordoj al strato Jamerdana kaj al la korto mem; kaj oni dediĉis al la Reĝa Konkirinto, ĉar ĵus oni finis konstrui ĝin, kiam oni sanktigis la Reĝon konkirintan Sevilla'n. Ĝi havas unu solan navon el grekoromana stilo kun barokaj ornamaĵoj. Ĉe la granda altaro oni admiras belajn pentraĵojn, kiuj vidigas la Sanktan Vespermanĝon kaj Sanktan Ferdinandon ĉe la momento kiam la Eklezio kronas lin; ĉi tiu lasta pentraĵo estas de Valdés Leal. Altiras atenton de l' vizitanto du belegaj reliefaĵ bustoj de Sankta Johano la Baptisto kaj Sankta Johano la Evangeliisto, kiuj apartenas al la skolo de Sevilla, XVI^a jarcento. De sur la muroj kaj de iuj altaroj altiras la vizitanton mirindaj pentraĵoj de Valdés Leal, aliaj atribuitaj al Herrera la Maljuna, al Roelas kaj aliaj famaj artistoj; kaj same okazas pro mirindaj statuoj de Martínez Montañés kaj pro aliaj laŭ stilo de Duque Cornejo.

Ankaŭ en ĝi estas kupropentraĵoj el XVII^a jarcento, kaj du ravantaj barokaj urnoj entenantaj relikvojn, kiuj devenas de Romo. Ankaŭ estas interesaj grupoj el malgrandaj koralaj figuretoj, amerikanaj verkoj de la XVII^a jarcento laŭ oni supozas.



Kvartalo de Santa Cruz: Korto

La belaj freskoj ornamantaj la murojn kaj volbon de la preĝejo estis pentrataj de Juan de Valdés Leal kaj de lia filo Lucas.

Oni devas viziti la Sakristion kiu entenas ankaŭ tre belajn kaj rimarkindajn artaĵojn.

IGLESIA DE SAN PABLO (PREĜEJO DE SANKTA PABLO)


Strato Bailén (Urbokarto. F. 6). Enirante tra la sakristio, oni povas ĝin viziti je kiu ajn horo de la tago.

La Paroĥejo de la Magdalena, ankaŭ nomata tiel, (de Sankta Pablo) estas unu el plej interesaj preĝejoj de Sevilla. Ĝi havas tri navojn kaj ĉe la loko en kiu formiĝas la kruco la volbo fariĝas kupolo; muraj pentraĵoj ornamas ĉion, la plej rimarkindaj estas de Lucas Valdés.

La granda altaro estas baroka, ĉe ĝi estas la belega bildo de la Magdaleno, kaj ĉe aliaj tre belaj kaj delikataj altaroj staras la mirindaj statuoj de la Sankta Virgulino de la Amparo (Protektaro), de la Dipatrino de la Fiebras (Febroj) kaj la Krucumito de l' Kalvario, skulptitaj de spertaj artistoj.

En la baptovazo de ĉi tiu preĝejo oni baptis la senmortan genian pentriston Bartolomé Esteban Murillo.

Ĉe la maldekstra flanko de la ĉefa pordo, estas la kapelo de la Hermandad de la Quinta Angustia (Frataro-Religisocieto de la Kvina Angoro), tre interesa pro sia arkitekturo. Ĉe ĝi



Kvartalo de Santa Cruz: Strato Pimienta

estas metata sur brankardo, same, kiel oni portas ĝin dum la procesioj de la Sankta Semajno, statuaro nomata Mistero de l' Krucumitmalle-vigo, kiu estas el plej belegaj pasiogrupoj de Sevilla.


IGLESIA DE SANTA ANA (PREĜEJO DE SANKTA ANA)

Strato Pureza, n.º 90 (Urbokarto. I. 6). Vizitebla je kiu ajn horo el tago, enirante tra la sakristio.

Oni opinias, ke la Reĝo Alfonso X^a. la Kle-rulo, je 1276, ordonis ĝin starigi por danki Dion pro sia resaniĝo el okulmalsano.

Ĉe ĉi tiu belega preĝejo mirinde kuniĝas la romana, ogiva kaj mahometa stiloj kaj pro ĉio ĝi estas la preĝejo plej interesa el ĉiuj de Sevilla.

La granda altaro estas renesanca, kun dek-kvin pentraĵoj sur ligno, de la flamanda pentristo Pedro de Campaña. En la ĉambreto post la granda altaro oni admiras la bildojn de Sankta Ana kaj de la Dipatrino, kiuj, laŭ oni opinias, estas samepokaj je la fondo. En ĝi estas aliaj pentraĵoj sur ligno, de Campaña, kaj iuj atribuitaj al Roelas kaj al flamanda Frutet; sed altiras eksterordinare la atenton, pro sia arta merito, la primitivo reprezentanta la Sanktan Virgulinon de la Rozo, de la fama Alejo Fernán-dez, kiu estas ĉe la altaro de posfhorejo. De la sama aŭtoro estas du pentraĵoj sur ligno metitaj en la muro ĉe la piedo de la preĝejo.



Kvartalo de Santa Cruz: Krucio de la Cerrajería

TURISTOJ

VIZITU LA FABRIKOJN POR ARTAJ
CERAMIKAĴOJ DE

Mensaque, Rodríguez y Compañía, S. A.

KAJ ĜIAJN KONSTANTAJN
EKSPOZICIOJN

Str. SAN JACINTO núm. 93 kaj Str. EVANGELISTA núm. 41

(Triana) SEVILLA



YBARRA Y COMPAÑÍA S. EN C.

ENTREPRENO POR NAVEGACIO

SEVILLA

TRANSATLANTIKA LINIO :: :: poŝta kaj komerca inter la havenoj de la Mediteraneo al Brazilo, Urugvajo kaj Argentino, eliro de Génova la 25an tagon kaj de Buenos Aires la 15an, ĉiu monate.

TRANSATLANTIKA LINIO :: :: poŝta kaj komerca inter la havenoj de la Mediteraneo kaj Usono eliro de Génova la 15an kaj 30an tagojn, kaj de New-York samajn tagojn, ĉiu monate.

TRANSATLANTIKA LINIO :: :: poŝta kaj komerca inter la havenoj de la Kantabra Maro, Sevilla kaj Usono; unu vojaĝo ĉiu 25 tagojn.

VOJAĜOJ KAJ SERVOJ INTER LA HAVENOJ DE LA PRESKAŬINSULO regulaj, ĉiudusemajnaj inter Bilbao, Marseilla kaj havenoj inter tiuj du.

Por informoj sin turnu al la DIREKCIO, Poŝtkesto, 15, SEVILLA, kaj ĉe la havenoj al respektivaj Rezentantoj



Ibero-Amerikana Ekspozicio: Palaco de Belaj Artoj

La brikoj de la kapeloj estas tre interesaj, iujn oni alnomas de Sankta Ana, kaj ilin desegnis kaj kolorigis Niculoso Pisano.

Apud la pordo de la preĝejo, al oriento, ĉe la suba parto de l' muro, estas tombkovrilo el brikoj emajlitaj, dediĉita al Iñigo López, subskribita ankaŭ de Niculoso Pisano.

IGLESIA DEL DIVINO SALVADOR

(PREĜEJO DE LA DIA SAVINTO)

Plaza de l' Salvador (Urbokarto. F. 4). Enirante tra la sakristio, oni povas ĝin viziti je kiu ajn horo de la tago.

Ĉe la centro de la urbo staras la mirindega preĝejo de l' Savinto, kiun klera artisto aljuĝis Katedralo de la baroka stilo en Sevilla. Ĝi havas trivastajn navojn kaj belan kupolon. La granda altaro, tiu de l' Sagrario (Hostiotenejo), kaj tiu de la Sankta Virgulino de l' Akvoj, estas laŭ stilo de Churriguera, tre amplekseĝaj je proporcioj.

La plej belaj statuoj de Montañés estas en ĉi tiu preĝejo: tiu de nia Patro Jezuo de la Pasio, kiun oni alnomas El Pasma de Montañés (La Miro de Montañés), kaj tiu de la Krucumito de l' Amo.


Ĉe la korto oni povas admiri tre interesajn kapitulojn de antikvaj kolonoj.

Ĉe la enirejo al la korto, estas la kapelo de nia Sankta Sinjoro de los Desamparados (de la Forlasitoj), al ĉi tiu bildo estas granda pieco kaj fervoro en Sevilla.

MURALLAS ROMANAS DE LA MACARENA

(ROMANAJ REMPAROJ DE LA MACARENA)

Norden de Sevilla (Urbokarto. A. B. 2 kaj 3), Ankoraŭ staras grava parto el la rem-



Ibero-Amerikana Ekspozicio: Reĝa Pavilono

paroj starigitaj de la romanoj ĉirkaŭ la urbo, de la Pordo de la Macarena ĝis tiu de Córdoba, kun naŭ turoj kronitaj de kapprotektiloj. La Muroj estas el konglomerata kaj brika masoj. Antaŭ la muroj staras pli malalta remparo, kaj certe inter ambaŭ estis la fosaĵo; kaj ĉio elpruvigas la klarecon kaj spertecon de la romanoj pri la fortikajarto. La araboj rekonstruis la remparojn. Ĝia arĥeologia intereso estas tre granda.

MUSEO PROVINCIAL DE BELLAS ARTES
(PROVINCA MUZEO DE BELAJ ARTOJ)

Plaza de l' Conde de Casa Galindo (Urbokarto. E. 6).
Malfermita:
De la 1^a de Aprilo al la 30^a de Junio: de 10^a M. ĝis
la 4^a P. T.
De la 1^a de Julio al la 30^a de Septembro: de la 9^a M. ĝis
la 2^a P. T.
De la 1^a de Oktobro al la 31^a de Marto: de la 10^a M. ĝis
la 5^a P. T.


Bileto por ĝin viziti unu peseton. Dimanĉoj
senpage. Ĉiam senpage la eniro al Arĥeologia
Muzeo.

La Muzeo estas instalita ĉe la ekspreĝejo
kaj eksmonaĥejo de la Merced. Altvaloraj
emajlitaj brikoj devenantaj de malnovaj pre-
ĝejoj kaj palacoj ornamas ĝiajn ĉefajn gale-
riojn.

La kortoj, tre helaj, vidiĝas ĉarme, vere
pentrinde kaj alloge, pro siaj rampantaj plantoj,
floroj, arboj, k. t. p.

Ĉe la ekspreĝejo oni povas admiri pentro-
verkojn de Zurbarán, Herrera el Viejo (la
Maljuna), Herrera el Mozo (la Juna), Murillo,
Roelas, Castillo kaj aliaj famaj pentristoj de la
Skolo de Sevilla; ankaŭ mirindajn skulptitaĵojn
de Montañés.

Alia salono entenas la meritplenajn verkojn
de Valdés Leal; en najbara salono, oni admiras
la verkojn de Pacheco, majstro kaj bopatro de
la tutmondfama geniulo de la pentrarto Veláz-
quez, kaj pentraĵojn de aliaj artistoj; kaj en



Ibero-Amerikana Ekspozicio: Palaco de Artoj kaj Industrioj

apuda salono kolektiĝas la altvalora pentraĵaro
donacita de gesinjoroj González Abreu.

En la ĉefetaĝo, oni trovas la modernajn
verkojn, el ĉi tiuj, tiujn, kiujn donacis al la
Muzeo la edzino de la eminenta pentristo José
Villegas, naskiĝinta en Sevilla. Same en la
supraj galerioj, kiel en la subaj, abundas la
verkoj tre altvaloraj. En tute la Muzeo estas
riĉega

Ĉe la pedelejo oni povas akiri la Katalogon.

En la teretaĝo (salonoj, galerioj. k. t. p.) estas instalita la Arĥeologia Muzeo, riĉa precipe je romanaj kaj arabaj restaĵoj, tamen estas ankaŭ el ĉiuj epokoj, devenantaj de la ruinoj de Itálica, de preĝejoj kaj antikvaj palacoj de Sevilla kaj de ĝia provinco.

TORRE DE DON FADRIQUE

(TURO DE DON FADRIQUE)

Strato Santa Clara núm. 52. (Urbokarto. B. 5). Malfermita de la 9^a ĝis la tagmezo, kaj de la 2.^a posttagmeze ĝis la 6^a, senpage.

Ĝi estas unu el plej interesaj kaj bone konservitaj militmonumentoj de Hispanujo, ĝi estas de la XIII^a jarcento, kvankam la suba parto aŭ bazo verŝajne estas romana, sed la cetero estas mudehara. Laste oni ĝin aranĝis atenteme kaj delikate por ne difekti la stilon, dank' al sindonemo de la Urĥestraro de Sevilla, kiu ĵus akiris ĝin el la monaĥinoj de Sankta Clara.

La ĝardeno ĝin ĉirkaŭanta estas ĉarmega, en kiu la vojetoj estas ornamitaj ĉe l' bordoj de malnovaj kapitejoj, gravuritaj tombŝtonoj, difektitaj statuoj kaj aliaj arĥeologiaĵoj.

Dekstren de la ĝardeno kaj ĉe vasta ĉambro estas instalita la Urba Arĥeologia Muzeo, entenanfa tre interesajn specimenojn el romana, araba kaj renesanca arĥitekturo, kaj aliaĵojn.



Ibero-Amerikana Ekspozicio: Unu el la turoj de la Placo de Hispanujo
(Plaza de España)

UNIVERSIDAD (UNIVERSITATO)

Strato Laraña núm. 3 (Urbokarto. E. 4). Oni povas viziti ĝin je kiu ajn horo de la tago. La Biblioteko estas malfermata de la 10^a m. ĝis la 3^a posttagmeze, la labortagoj. Senpaga eniro.

Ĝi estis sidejo kaj instruejo de la Jezuitoj ĝis 1767^a, kiam la reĝo Karolo III^a dekretis translokiĝi en ĝin la Universitaton, kiun fondis Rodrigo Santaella.

Vastaj aŭloj kaj kortoj, laboratorioj kaj tre grava publika Biblioteko, estas en ĝi.

Estas tre interesa la Ĉefsalono, kun mirindaj emajlitaj malnovaj ceramikaĵoj kaj pentraĵoj el famaj artistoj. Sed la ĉefe vizitinda parto estas la preĝejo, ĉar ĝi entenas tiom da artaĵoj kaj memoraĵoj, kiom da ili entenas kiu ajn el plej riĉaj preĝejoj de Sevilla. Ĉizis la ornamajaron de la granda altaro Alonso Matías kaj en ĝi estas pentraĵo de Roelas «La Sankta Familio»; aliaj de Juan de Varela, «Naskiĝo de Jezuo» kaj «La Adorantaj Reĝoj»; alia de Francisco Pacheco, «La Anunĉiaco»; de Alonso Cano, «Sankta Johano la Baptisto» kaj «Sankta Johano la Evangeliisto», kaj la statuoj de Sankta Petro kaj de Sankta Paŭlo, kiujn skulptis Martínez Montañés.

Plie, altiras forte la atenton: Krucumito kaj Sankta Virgulino de tiu senmortan genio de la skulptarto; predikejo el nigra mahagono, deli-



Ibero-Amerikana Ekspozicio: Centra parto de la Konstruaĵo de la Placo de Hispanujo (Plaza de España)

CREDIT LYONNAIS, S. A.

BANKO FONDITA JE 1863

Kapitalo tute elpoŝigita 255.000.000 da frankoj



LA FILIO DE SEVILLA


Efektivigas ĉiajn kutimajn bankopraktikoj
Aĉetante kaj vendante monerojn kaj bankbiletojn
fremdajn :: Pagdokumentoj por ĉiuj landoj
Luotaj kofroj :: Magazenoj por oleoj, cerealoj
kaj ĝeneralaj komercaĵoj

SEVILJAJ VENTUMILOJ REMEMORAĴOJ PRI SEVILLA

LA PLEJ GRAVA VENDEJO
DE ANDALUZIO

CASA RUBIO

STRATO SIERPES, 66



Parko de María Luisa: Laĝeto

kate mirinde ĉizita, laŭ oni opinias, de jezuito; la Maŭzoleoj de familianoj Perafán de Ribera el blanka marmoro de Carrara kaj en Génova konstruitaj, laŭ ordonoj de Don Fadrique Enríquez de Ribera, unua Markizo de Tarifa.

Ankaŭ estas en ĝi la tomboj de la senmortaj kaj spritaj poetoj naskiĝintaj en Sevilla, Reinoso, Lista kaj Bécquer, de la fama Humanisto Arias Montano, de Rodrigo Caro kaj de iuj kavaliroj el la nobelaj familioj Ribera kaj Ponce

CECIL HOTELO

PLAZA DE SAN FERNANDO

SEVILLA

Telefono n.º 665 :: Telegrafu aŭ telefonu al
CECIL HOTEL

Admirinde situata ĉe la plej bona placo de la urbo.
Fasado al la Sudo :: Ĉarma tipa andaluzia korto
Tutplene renovigita je 1927, nova meblaro kaj ĉio
laŭ plej granda komforto

Telefonoj, fluanta akvo en ĉiuj ĉambroj, kaj iuj el
ĉi tiuj kun bonegaj banejoj kaj w. c.

CENTRA VARMIGADO POR ĈAMBROJ,

:: :: SALONOJ KAJ CETERE :: ::

Aŭtomnibuso de la Hotelo je la alveno de ĉiuj
vagonaroj

MEBLOJ

SPECIALE LAŬ "HISPANA ARTO"


MARTINEZ MARTIN

Magazenoj } Strato ALFONSO XII n.º 18
kaj vendejo

Laborejo } Str. Marqués de Paradás n.º 13
kaj oficejo

TELEFONO N.º 414

SEVILLA



Parko de María Luisa: Placeto Alvarez Quintero

de León. La portalo de ĉi tiu preĝejo estas greko-romana.

OTROS LUGARES QUE DEBEN VISITARSE


(ALIAJ LOKOJ VIZITINDAJ)

Ne forlasu Sevilla'n antaŭ ol viziti: La kvar-
talon Sankta Cruz (Urbokarto. H. 3), kiu estas

la plej tipa kaj elvokanta de la urbo pro siaj mallargaj kaj zigzagaj stratoj, siaj misteraj placoj kaj trankvilaj legendaj lokoj. En ĝi estas: la placo de la Donja Elvira, loko en kiu staris la teatro de la sama nomo, kie Lope de Rueda ludigis siajn teatraĵojn; stratoj plenaj je poezio, tiuj de Susona, Vida, Pimienta, Justino de Neve kaj Agua; la placo de Sankta Cruz, en kiu staris alitempe preĝejo de la sama nomo, en kiu kuŝas la restaĵoj de la senmorta pentristo de Sevilla Bartolomé Esteban Murillo, kaj ĉe kies ĝardenoj staras la mirinda Kruco de la Cerrajería, el forĝita fero, vere arta juvelo; ankaŭ la Hospitalo de la Riverencindaj Pastroj kies preĝejo kaj korto estas rimarkindaj.

Ĉe la suba parto de ĉi tiu kvartalo etendiĝas la Belaj Ĝardenoj de Murillo kaj de Catalina de Ribera, kie staras monumento al la memorinda eltrovinto de l' Nova Mondo Cristóbal Colón kaj al la sindonemega donacintino la hospitalon de la Kvin Vundoj, Don a Catalina de Ribera.

Proksimaj de ĉi tiuj ĝardenoj ekvastiĝadas la nekomparebla Parko de María Luisa (Urbokarto. J. 3). Ĝardenoj sugestiantaj kaj revigantaj, en kiuj staras la grandiozaj kaj belegaj palacoj por la Ekspozicio Ibero-Amerikana, kun mirigantaj Placoj de España kaj Amerika, kaj belegaj placetoj dediĉitaj al Kihoto, Bécker, fratoj Alvarez Quintero, José María Izquierdo, Mas y Prat, k. c. Ankaŭ estas belaj kaj emociigaj la malnovaj Ĝardenoj de las Delicias (Urbokarto. M. 3) en kiu staras tre belaj statuoj kaj busto honoranta la genian valencian pentriston Joaquín Sorolla, kies penikoj mirinde ĝuste kopiis la helecojn de nia ĉielo kaj la belegajn kolo-



Parko de María Luisa: Lageto

rojn de nia lando per kiuj ĉi tiu sin vestas.

Anĉ aŭ estas vizitindaj: La Fabriko por Tabakajoj (Urbokarto. I. 3). Monumenta baroka konstruaĵo, kie oni rememorigas la bravan kaj pasian cigaredistinon «Carmen»; la Fabriko por fajencaĵoj «La Cartuja» (Urbokarto. C. 8), en la dekstra bordo de l' rivero, proksima je Triana, ne nur oni devas ĝin viziti por admiri la gravecon de la industrio, sed ankaŭ por admiri la malnovajn restaĵojn de Kartusiana Monaĥejo

kaj la laŭditajn kaj famajn ceramiklaborejojn. Vizitu nepre La Aerodromon de Tablada (Urbokarto. O. 5), kies graveco estas e^lsterordinara; la Cruz del Campo (La Krucon de l' Kam-
po), (Urbokarto. G. 1), kie staras gotika tem-
pleto el briko, ĉe la enirejo al Sevilla, sur ŝoseo
de Alcalá de Guadaira; la turo n de Sankta Mar-
ko (Urbokarto. C. 3), de Sankta Marina (Urbo-
karto. B. 3), de Sankta Katalina (Urbokarto.
E. 3) kaj de l' Oro (Urbokarto. I. 5); la statua-
ron, kiun oni nomas La Virgen de la Esperanza
(La Virgulino de la Espero) en la preĝejo de San
Gil, ĉe la Kvartalo de la Macarena (Urbokarto.
A. 3); Nuestro Padre Jesús del Gran Poder (Nia
Patro Jezuo de la Granda Povo), ĉe Sankta Lo-
renzo (Urbokarto. C. 5) kaj la Cristo de la Ex-
piración (La Krucumiton de la Lastelspiro), po-
pole nomata El Cachorro (Kaĉoro), ĉe lia kapelo
del' Patrocinio (Triana), (Urbokarto. F. 9).

PRINCIPALES EXCURSIONES (ĈEFAJ EKSKURSOJ)

ALCALÁ DE GUADAIRA

Pentrinda urbeto, kun belegaj ĉirkaŭaĵoj, je
15 kilometroj de Sevilla.

Tre vizitindaj estas la Kastelo de Alcalá kaj
de Marchenilla, la muelejoj de San Juan, Be-
nazola, Aceñas, Algarrobo kaj tiuj de Marche-
nilla, kaj la pejzaĵoj de la bordoj de la rivero
Guadaira.

Estas oportunaj aŭtobusoj, kies haltejo estas
en Sevilla en la strato Almirante Lobo (Puerta
de Jerez). Bileto kostas unu peseton. Aŭtobuso
eliras ĉiuduonhore.

Alcalá staras sur vojo de Sevilla al Mairena-
Carmona, fial, se oni vojaĝus partikulare aŭ per
luita aŭtomobilo, estas konsilinde fari kompletan
eks^kurson, vizitante la du lastajn urbojn.

ARACENA

Grava urbeto de la Montaro je 90 kilometroj
de Sevilla. Ĝi posedas la Groton de la Mirinda-
ĵoj, kiu estas unu el plej vastaj kaj mirindaj pro-
siaj stalaktitoj, stalagmitoj kaj mirigantaj formi-
taĵoj, kvazaŭ kompleta subtera ensorĉita palaco
de feoj kaj feinoj. Ankaŭ ĝi posedas araban kas-
telon, sub kiu estas la groto; preĝejon de la Ka-
valiroj de l' Templo, la Parohejon en kiu ĵus oni
malkovris belan artegan Krucumiton de Martínez
Montañés; la pejzaĵojn kaj fontojn de Zulema,
Julianita, de l' Reĝo kaj de l' Castaño (kaŝ-
tanarbo).

Oni povas vojaĝi per la ordinara aŭtobuso
eliranta el Sevilla de la strato Marqués de Pa-
radas, 37; je la 7^a. matene, por alveni al Arace-
na je la 9^a. kaj 37 minutoj. La revenon oni povas
fari per la sama servo, elirante el Aracena je la
7^a vespere, alvenante al Sevilla je la 10^a. Iro kaj
reveno: I^a. klaso, 26,70 pesetojn; II^a. klaso,
21,40pesetojn.

Tagmanĝo ĉe Hoteloj Arias Montano kaj
San Francisco, aŭ en la Kazinoj Arias Montano
kaj Obrero (Laborista).

VOJAĜOJ AL ARACENA

CIUTAGA REGULA SERVO
AL ARACENA KAJ MONTARO

EMPRESA CASAL

ELIRO DE SEVILLA . . . JE la 7
ALVENO AL SEVILLA . . . JE LA 22

PREZOJ POR IRO KAJ REVENO { I KLASO, PESETOJN 13,65
II KLASO, PESETOJN 11,00

Precizaj ekskursoj al Aracena kaj Groto de la
Mirindaĵoj ĉiudimenĉe kaj ĉiuj festaj tagoj

Prezoj por iro kaj reveno kun tagmango kaj vizito
al la Groto ĉio en kalkulita

PREFERLOKO PESETOJN 35
UNIA KLASO „ 30
DUA KLASO „ 25

Oni aranĝas eksterordinarajn ekskursojn por grupoj el turistoj
kiujn oni devas nepre antaŭpagi

Oficejo: Strato MARQUÉS DE PARADAS n.º 37 :: SEVILLA

BANCO ESPAÑOL DEL RÍO DE LA PLATA

SIDEJO: STR. RECONQUISTA, 200 :: BUENOS AIRES
FILIO DE SEVILLA :: STRATO RIOJA, 21

Ordinara abonita . \$ m/l 25.000.000
Preferita, abonita . „ 25.000.000
KAPITALO: Elpoŝigita „ 28.546.420
Fondo de rezervo „
kaj singardemo 15.808.607,95
(laŭ bilanco de la 30 de junio de 1927)

AGENTEJOJ: Ĉe la ĉefurbo de la Argentina respubliko, 17. Filioj en la teritorio de la respubliko, 24. En fremdaj landoj: Barcelona, Bilbao, Coruña, Madrid, Pontevedra, San Sebastián, Santiago de Compostela, Sevilla, Valencia, Vigo, Montevideo, Génova, París kaj Londono. Ĉi tiu Banko faras ĉiajn bankajn operaciojn kaj pagas la Travellers' ĉekoj. Oficiala reprezentanto por Hispanujo kaj cetero el Eŭropo de la Hipoteka Nacia Banko de Argentina Respubliko.

Estas ankaŭ alia servo de aŭtobuso, kun eliro de Sevilla, je la posttagmezo de la stratoj Arjona, Santas Patronas kaj Almirante Lobo.

GRUTA DE LAS MARAVILLAS EN ARACENA

(GROTO DE LA MIRINDAĴOJ EN ARACENA)

IMPRESOJ DE TURISTO

Mi konas aliajn similajn grotojn, kia estas tia de Aracena, pro kio mi opiniis ne miri vizitante ĉi tiun

Mi multe estimas la afablan inviton, kiun faris al mi la Prezidanto de la Patronaro por la Groto, dank' al kiu mi konis tiom da mirindaĵoj. Ĝusta tutplene estas la nomo, kiun oni donis al la Groto; kaj la turisto, ĉiam avida je emocioj, trovas ĉi tie, meze de surprizoj, miroj kaj ekkrioj, sensaciojn, emociojn, pri nekonataĵoj, pri nesupozitaĵoj, impresojn kvazaŭ eksterordinaran nemondan revon.

Ĉu subteran kastelon, laŭ orienta fantazio; ĉu palacon de feinoj, de ensorĉitaj princinoj; ĉu magian konstruaĵon kun salonoj lumigataj de fulmobrilaj reflektoj de brilantoj kaj smeraldoj, kun ĉambroj pavumitaj el arĝentoj kaj filigrana maŝo enkatenaanta riĉan ŝtonaron, kun plafonoj montrantaj neimageblajn arabajn, de kiujn pendas kvazaŭ kurtenoj damaskigitaj kaj kristale trvideblaj; kun kolonoj el alabastro pendantaj kaj finiĝantaj akrepinte, aŭ tordiĝantaj, similigitaj inversigitajn kandelabrojn kun iliaj kandeloj; kun koridoroj kaj galerioj, tra kiuj oni aliras al novaj ĉambroj kaj sekretejoj, kie la filtrita akvo milde amasiĝas ĉe parfumita hanejo por sultanino, kaj tiel pure, kristale, klare, la akvo amasiĝas, ke ĝi speguliĝas same, kiel la plej perfekta spegulo.

Tia estas la impreso de magia revo persistanta ĉe

mia menso, ke ĝi ĉiam restados, kiel vizio grandioza kvankam reala kaj granda kaprico de l' naturo.

Mi promesis verki ion pri la Groto, kiel konscian simplan gvidilon por la vizitanto, lujn fojojn, mi tion celis, sed mi ne tion povis fari, ĉar en mia penso ne ŝprucis konceptoj povantaj esprimi klare ĉion, kio en mia refino gravuriĝis. Vana celo priskribi ĝin; estas necese viziti ĝin por senti serion da surprizoj kaj emocioj.

La geologia formado de l' stalaktitoj kaj stalagmitoj laŭ ĝenerala amaso estas pli difinita aŭ preciza en aliaj grotoj, kiujn mi konas, ol en ĉi tiu; kaj oni povas diri, ke ĉi tiuj estas pli malnovaj ĉar eble la filtrado de la kalka akvo estas pli regula ol en tiu de Aracena; sed la Groto de la Mirindaĵoj prezentas la karakterizon de juneco, de pli malrapida formado, de filtrado pli varia, kaj jen kial ĝiaj kristaliĝoj estas tiel diversaj kaj nekompareble belaj.

Supermezure surprizas la neĝa blankeco el iuj kaj tamen ilia diamanta travidebleco, Ĉiu tiuj tipaj kristaliĝoj estas la plej multenombraj, sed ankaŭ la plej variaj: stalaktitoj, stalagmitoj, floriĝoj, vegetaliĝoj.

La karnoroza koloro etendiĝas samegale sur stranjajoj, kvazaŭ homtrunkoj interplektiitaj, arbotrunkoj kaj arbustoj, kariatidoj kaj kolonoj.

Ĉe galerio kaj ĉambro malvastaj, ĵus elkovritaj, regas la turkisblua koloro sur vegetaliĝoj kaj floriĝoj.

La plej vasta galerio estas kvazaŭ salonego larĝa kaj alta pli ol kvar dek metrojn. Ĝi entenas tre profundan lagon, larĝan sesdek metroj kaj tie oni admiras, krom la kristaliĝoj aluditaj, la muskajn tavolojn en la planko, kaj la kvazaŭ kurtenojn, kun ruĝaj strioj, hazardaj pendantajn de la plafono.

La Groto entenanta tiom da mirindaĵoj estis disponata por la turismo dank' al la sindonemo de l' Markiza Moŝto de Aracena kaj de Don Johano de l' Cid López; ĝi havas oportunajn irejojn kaj ŝtuparojn al diversaj galerioj. La lumigado estas elektra, tre sperte instalita.

La esplorado, konservado kaj administrado, estas taskoj de patronaro, kies Prezidanto estas la klera kaj sperta Moŝto, Sro. Javier Sánchez-Dalp Maraŝón, kiu ne laciĝas oferi monon kaj doni stimulojn por devigi ĉiujn turistojn viziti la nekompareblan Groton de la Mirindaĵoj.

CARMONA

Ĝi estas unu el plej gravaj urboj de la provinco Sevilla je tridek unu kilometroj de la provinca ĉefurbo. Ĝiaj ĉefaj monumentoj estas: la Romana Nekropolo de la tre antikva Carmona, kun interesaj funebroĉambroj, murpentraĵoj, statuoj, kolonoj, k. t. p., interesa Muzeo el arĥeologiaĵoj elfositaj ĉe la Urbo; la Alkazaro, la Alkazaro de la Pordo de Sevilla, ĉi tiu Pordo kaj tiu de Córdoba. El la preĝejoj indaj je vizito estas: tiuj de Santa María kaj San Felipe, entenantaj mirindajn artoverkojn.

Oni povas fari la vojaĝon per vagonaro, ĉu de la K-io. M. Z. A., ĉu per tiu de Sevilla-Alcalá-Carmona. Ankaŭ per aŭtobuso, kiu eliras el Sevilla (strato Almirante Lobo) je la 7,30, 13 kaj 19, revenante je la 8,30, 12,30 kaj 19,30, horoj.

Prezo: 8 peseto n proksimume iro kaj reveno.

Tagmanĝo, ĉe Hotelo Comercio.

Se oni vojaĝus per propra aŭ luita aŭtomobilo, estas rekomendate viziti samtempe Alcalá de Guadaira kaj Mairena sur la sama vojo.

ITÁLICA

Je dekdu kilometroj de Sevilla. Restaĵoj de romana urbo. Nur restas la amfiteatro, kun belaj galerioj, portikoj kaj bestejo, plenaj je intereso. Estas vizitindaj la restaĵoj de la Baŝejo, apud kiu oni elfosis mirinda n mozaikojn.

Ĉe la najbara vilaĝo Santiponce, oni devas viziti la monaĥejon Sankta Isidoro del Campo, kiu havas mirinda'n statuojn, maŭzoleojn kaj renesancan altaron, de Mariñez Montañés.

La plej oportuna vojaĝo estas per aŭtomobilo, po tridek pesetoj proksimume. Estas aŭtobusa servo ĝis Santiponce. Bileto, 1'50 pesetojn, kaj oni povas piediri mallongedaŭre de ĉi tiu vilaĝo al la ruinoj.

MAIRENA DEL ALCOR

Ĝi staras e dudekkvin kilometroj de Sevilla, en kies kastelo havas la eminenta elserĉanto Don Jorge Bonsor tre interesan Arheologian Muzeon. Estas vizitinda la araba portalo de tio, kio estis Palaco de la Duko de Osuna.

Oni povas ekskursi per aŭtobuso same, kiel oni diris por Carmona, kaj reveni je la 9, 13 kaj 20. Irante per propra aŭ luita aŭtomobilo, atentu kaj vizitu Alcalá kaj Carmona.

HOTELO FRANCIA

SITUATA ĈE LA CENTRO
DE LA URBO

TUTPLENE MODERNA KOMFORTO
MODESTAJ PREZOJ

STRATO: MÉNDEZ NÚÑEZ N.º 7

SEVILLA

TODO DE OCASION

(ĈIO TRE MALMULTEKOSTE)


JUVELOJ - HORLOĜOJ - BELAĴOJ
POR DONACOJ

VENTUMILOJ = ANTIKVAĴOJ
LA PLEJ RIMARKINDAJ BRODITAJ ŜALOJ
ESTAS SPECIALAĴO DE LA FIRMO

FÉLIX POZO

Strato, Velázquez n.º 13 (Kontraŭ la Hotelo Simón)

SEVILLA



SEVILLA
PLANO DE LA CIUDAD

A B C D E F G H I J K L M N O

HOHENLEITER

KATOLIKA LIBROVENDEJO

VELÁZQUEZ, 6

SEVILLA

PRESEJO ꞑ PAPERVENDEJO
ĈIAJ ILAROJ POR OFICEJOJ
BINDEJO ꞑ RELIGIAJ ꞑ ILAROJ
ĈIUSPECAJ ꞑ ELDONADO DE
LIBROJ KAJ REVUOJ KAJ DE
ĈIAJ ALIAJ LABOROJ DE LA
PRESARTO ĈU ARTAJ ĈU
ꞑ ꞑ ꞑ INDUSTRIAJ ꞑ ꞑ ꞑ



Aracena: GRUTA DE LAS MARAVILLAS